esperanto.es

# La Bitbulteno

NUMERO: 31
2016-10-24

**Saluton !**

**He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la Federación Española de Esperanto.**

**Jen nova numero de la Bitbulteno de Hispana Esperanto-Federacio.**

## TERUEL SERÁ LA SEDE DEL PRÓXIMO CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

La directiva de la Federación Española de Esperanto ha aprobado que el **76º Congreso Español de Esperanto**, tendrá lugar del 23 al 25 de junio del año 2017, en la ciudad aragonesa de **Teruel**.

El encuentro será organizado por la asociación turolense de esperanto "*Liberanimo*", que en los últimos años ha ido consolidando su actividad con la organización de varios cursos de esperanto en la ciudad y otras actividades de difusión.

El congreso del año 2017 tendrá lugar el año en el que se conmemora el 100 aniversario del fallecimiento del Dr. Zamenhof, el iniciador del esperanto, y el 130 de la edición del primer libro en el que se proponía este nuevo idioma internacional.

Muy pronto iremos presentando las primeras informaciones sobre el Congreso español de Esperanto de Teruel, incluyendo el lugar, el programa, las actividades pre- o post-congresuales, y las condiciones de inscripción. Mientras tanto, recomendamos a las personas interesadas que vayan reservando las fechas, y que escriban a la dirección kongreso@esperanto.es si desean mantenerse informados.

Más información sobre el Congreso, y sobre las ediciones previas, en la página web http://www.esperanto.es/congreso

## LA 76 HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZOS EN LA ARAGONA URBO TERUELO

La estraro de Hispana Esperanto-Federacio decidis ke la venonta 76 Hispana Kongreso de Esperanto okazos en la aragona urbo Teruelo (Teruel) de la 23-a ĝis la 25-a de junio 2017.

La renkonto estos organizata de la teruela esperantista asocio "Liberanimo", kiu dum la lastaj jaroj firmigis sian aktivecon, per la organizado de pluraj kursoj en la urbo kaj aliaj disvastigaj agadoj.

La kongreso de Teruelo okazos en la jaro kiam ni kunmemoros la 100an datrevenon de la forpaso de D-ro Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, kaj la 130an de la eldono de la Unua Libro en kiu oni proponis tiun ĉi novan internacian lingvon.

Tre baldaŭ ni komencos prezenti la unuajn informojn pri la Kongreso, inklude de la lokoj, la programo, la antaŭ-aŭ post-kongresaj aktivadoj, kaj la aliĝkondiĉoj. Dume, ni rekomendas la interesatajn homojn rezervi la datojn, kaj skribi al la retadreso kongreso@esperanto.es por resti informataj.

Pliaj informoj pri la Kongreso, kaj pri la antaŭaj eldonoj, en la retejo http://www.esperanto.es/kongreso



**HEF ABRE UN DEBATE SOBRE EL CAMBIO DE ESTATUTOS DE UEA**

Durante el último Congreso Internacional de la Asociación Universal de Esperanto (UEA), el pasado julio en Nitra (Eslovaquia), se aprobó la propuesta de nuevo estatuto, con cambios en diversos artículos. Esta propuesta debe ser ratificada por los miembros, tanto los individuales como las asociaciones nacionales que forman parte de UEA.

También la Federación Española de Esperanto (HEF) dispone de derecho al voto, y por esta razón la directiva de HEF ha decidido abrir un debate entre nuestros miembros. Si eres miembro de la Federación, te invitamos a dar tu opinión sobre los cambios propuestos.

Puedes encontrar más detalles en nuestra página web, y también en el próximo número de nuestro *Boletín*, que pronto llegará al domicilio de los miembros. En cualquier caso, quien desee recibir más detalles, puede escribir a la dirección hef@esperanto.es.

Como primer intento de abrir este debate, HEF, en colaboración con el Liceo Madrileño de Esperanto, ha convocado un coloquio en la sede madrileña de la asociación. Tendrá lugar el lunes 24 de octubre, a las 7 de la tarde, en la calle Rodríguez San Pedro, 13, 3 de Madrid. Será conducido por: José Antonio del Barrio, presidente de la Federación y Alejandro Escobedo, presidente de la sección juvenil, con un debate posterior.

Las personas que no puedan acercarse, pueden enviar sus opiniones o sus dudas a la dirección hef@esperanto.es. Además, queremos incitar a los clubes o asociaciones locales a organizar debates similares, y remitir sus conclusiones a la directiva de HEF. No dudéis en solicitar más información o ayuda, si es necesario.

HEF tomará la decisión sobre el sentido de su voto en la próxima reunión de la directiva, a finales de noviembre o comienzos de diciembre.

Más información (en esperanto)

**HEF MALFERMAS DEBATON PRI LA STATUTŜANĜOJ DE UEA**

Dum la Universala Kongreso en Nitro dum pasinta julio, kunvenis la Komitato de UEA, la supera organo de la Asocio, kaj aprobis proponon de nova Statuto, kun diversaj ŝanĝoj en pluraj artikoloj. Tiujn ŝanĝojn nun devas ratifi (aŭ malaprobi) la membraro, tiel la Individuaj Membroj, kiel la aliĝintaj asocioj.

Ankaŭ Hispana Esperanto-Federacio (HEF), kiel landa asocio de UEA, rajtas je voĉdono, kaj antaŭ ol decidi nian voĉdonon, la estraro de HEF decidis malfermi debaton inter niaj anoj. Se vi estas membro de HEF, ni petas vian opinion pri la proponitaj ŝanĝoj.

Vi povas trovi pliajn detalojn, kun aldonaj ligiloj, en nia retpaĝo, kaj ankaŭ en venonta numero de *Boletín*, kiu baldaŭ alvenos al la hejmoj de la membroj de HEF. Ĉiukaze, tiuj, kiuj deziras aparte demandi pri la detaloj, povas skribi al HEF, al la retadreso hef@esperanto.es.

Kiel unua provo malfermi tiun ĉi debaton, HEF, interkonsente kun Madrida Esperanto-Liceo, kunvokis kolokvon en sia madrida sidejo. Ĝi okazos la lundon, 24-an de oktobro, je la 19:00 horo en la str. Rodríguez San Pedro, 13, 3 de Madrido. Ĝin gvidos: José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio kaj Alejandro Escobedo, prezidanto de Hispana Esperantista Junulara Societo, kun posta malferma debato.

Homoj ekster Madrido, kiuj tamen havas dubojn aŭ ŝatus doni sian opinion, povas skribi al hef@esperanto.es. Ni deziras instigi aliajn klubojn organizi similajn debatojn, kaj sendi siajn konkludojn al la estraro de HEF. Ne hezitu peti nian helpon, se vi tion bezonas.

HEF prenos la decidon pri la voĉdono, en la venonta kunveno de la estraro, fine de novembro aŭ komence de decembro.

Por scii pli.

## EL CONGRESO ANDALUZ DE ESPERANTO A PUNTO

Falta menos de una semana para el Congreso Andaluz de Esperanto, que tendrá lugar en Antequera, del 29 de octubre al 1 de noviembre.

Aún estás a tiempo de venir. Ya se han apuntado unas 60 personas de toda la península y varios otros países europeos.

El tema principal del congreso es “Esperanto y Naturaleza: Cielo y Tierra”. Su sede principal será un bello salón en el Museo Municipal, donde se disfrutarán de conferencias, literatura, presentación de nuevos libros, etc. Se visitarán los monumentos de la ciudad, así como los Dólmenes, declarados como Patrimonio de la Humanidad, el paraje de “El Torcal” y el famoso “Caminito del Rey”.

Durante el Congreso se organizará un homenaje al escritor hispano-canadiense Higinio García, nacido en 1939 justamente en Antequera, y fallecido en abril del 2010 en la ciudad canadiense de Alma, donde vivió la mayor parte de su vida adulta, y donde era conocido como intelectual, especialista en lenguas clásicas y gran conocedor de los místicos españoles.

Más informaciones:
https://andaluciaesperanto.wordpress.com/

## ALPROKSIMIĜAS LA ANDALUZA KONGRESO DE ESPERANTO

Restas malpli ol unu semajno por la Andaluza Kongreso de Esperanto, en Antekero (iom norde de Malago), de la 29a de oktobro ĝis la 1a de novembro.

Vi ankoraŭ povas aliĝi! Jam 60 homoj tion faris.

Kiel ni informis en pasinta Bitbulteno, la ĉefa temo de la kongreso estas “Esperanto kaj Naturo: Ĉielo kaj Tero”. Ĝi disvolviĝos en luksa kaj bela salono ene de la Municipa Muzeo de la urbo, kaj oni ĝuos prelegojn, deklamadon de poemoj, prezenton de novaj libroj, ludoj, ktp. Oni vizitos la monumentan urbon mem, kies megalitaj dolmenoj estis agnoskitaj kiel Heredan Havaĵon de la Homaro, kaj la naturajn belaĵojn “El Torcal” kaj la mondkonatan vojon “Caminito del Rey”.

Dum la Kongreso oni organizos omaĝon al la verkisto Higinio García, naskiĝinta en 1939 ĝuste en Antekero, kaj forpasinta en aprilo 2010 en la kanada urbo Alma, kie li vivis dum plejmulto el sia plenaĝa vivo, kaj kie li estis konata kiel intelektulo, specialisto pri klasikaj lingvoj kaj granda konanto pri la hispanaj mistikuloj.

Pliajn informojn:
https://andaluciaesperanto.wordpress.com/




## ESPERANTO EN “TIERRA Y LIBERTAD”

En la revista anarquista *Tierra y Libertad* (nº 338, septiembre 2016), se ha publicado un artículo en dos partes sobre el congreso anual de la Asociación Anacional Mundial (Sennacieca Asocio Tutmonda, SAT) en Herzberg am Harz (Alemania). Puede leerse en la red en la dirección
http://www.nodo50.org/tierraylibertad/338articulo5.html

La revista ha publicado ya anteriormente otros informes sobre actividades relacionadas con el esperanto. Es más, en todos los números de Tierra y Libertad, aparece una leyenda en esperanto: “Teron kaj liberon: anarkiisma perioda publikaĵo fondita en 1888. Eldonas Iberia Anarkiisma Federacio (aliĝinta al la Internacio de

## ESPERANTO EN “TERO KAJ LIBERO”

En la hispanlingva anarkiisma gazeto *Tierra y Libertad* numero 338, septembro 2016, aperis hispanlingva artikolo duparta pri la lasta kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en Herzberg am Harz. Ĝi estas rete legebla ĉe
http://www.nodo50.org/tierraylibertad/338articulo5.html

La gazeto jam antaŭe aperigis aliajn informojn pri esperantaj agadoj. Krome, en ĉiuj numeroj de Tierra y Libertad, en la kolofono sur la lasta paĝo legeblas jena ruĝlitera informo en Esperanto: “Teron kaj liberon: anarkiisma perioda publikaĵo fondita en 1888. Eldonas Iberia Anarkiisma Federacio (aliĝinta al la Internacio de Anarkiismaj Federacioj)”

Anarkiismaj Federacioj)”

Más información sobre el congreso de SAT, con fotos, puede leerse (en esperanto) en http://satesperanto.org/-Hercbergo-.html

Pliajn informojn pri la Kongreso de SAT, kun fotoj, eblas legi en http://satesperanto.org/-Hercbergo-.html




**DISCO “ESPERANTO” PRESENTADO EN MADRID**

El próximo 5 de noviembre se presentará en la sala “Moby Dick” de Madrid el último disco de la banda de rock Cronómetrobudú, titulado “Esperanto”.

El disco fue presentado por primera vez en España el pasado 1 de octubre en Burgos, en un concierto en el que intervino también nuestro compañero el poeta esperantista Miguel Fernández, que también participa en el disco, declamando el poema del Dr. Zamenhof “Ho, mia kor’”.

Esperamos la presencia de los esperantistas madrileños y otros compañeros que puedan visitarnos. Nos vemos allí.

**DISKO “ESPERANTO” PREZENTOTA EN MADRIDO**

En la nokto de la venonta 5-a de novembro estos prezentita en la diskejo “Moby Dick” de Madrido la plej lasta disko de la rokbando Cronómetrobudú, titolita “Esperanto”.

La disko estis prezentita unuafoje en Hispanio la pasintan 1-an de oktobro en Burgoso, en koncerto kie partoprenis nia kompano la poeto Miguel Fernández, kiu ankaŭ havas rolon en la disko, deklamante la poemon de D-ro Zamenhof “Ho, mia kor’”.

Ni esperas renkontiĝi tiun tagon kun la madridaj esperantistoj kaj aliaj vizitantoj. Ni tie intervidiĝos!




**NUEVA EXPOSICIÓN SOBRE OTRO ESPERANTISTA**

**NOVA EKSPOZICIO PRI ALIA ESPERANTISTO**

Post nia pasintbultena informo pri ekspozicio en

Tras la noticia de nuestro anterior *Bitbulteno* sobre la exposición en Zaragoza sobre el importante esperantista Francisco Azorín, podemos informar ahora sobre otra exposición sobre otro hombre importante que tuvo relación con nuestra lengua: este lunes se inaugura en Bilbao una exposición sobre el ingeniero y científico Leonardo Torres Quevedo, con una charla sobre su figura.


Torres Quevedo fue un gran defensor del esperanto, como puede leerse en este artículo: http://www.delbarrio.eu/torresquevedo.htm. Durante este año 2016 se están organizando diversas actividades para recordar su figura, aprovechando que se cumple el centenario del Spanish Aerocar, el transporte más antiguo aún en funcionamiento sobre las Cataratas del Niágara, que fue obra suya.

También en Bilbao tuvo lugar en julio otra exposición, con la ocasión de la presentación de un libro sobre otro esperantista, el consejero del primer gobierno autónomo vasco, Juan Gracia. Al acto fue invitado nuestro veterano amigo Eduardo Larrouy. Ahora es posible acceder a la biografía, que contiene un capítulo sobre su actividad esperantista, en la web del actual gobierno vasco.

Zaragozo pri la historia esperantisto Francisco Azorín, ni povas informi pri alia ekspozicio pri grava homo kun rilato al nia lingvo: venontlunde inaŭguriĝas en Bilbao ekspozicio pri la inĝeniero kaj sciencisto Leonardo Torres Quevedo, kun prelego pri lia figuro kaj graveco.

Torres Quevedo estis granda defendanto de la lingvo Esperanto, kiel oni povas legi hispanlingve en tiu ĉi artikolo: http://www.delbarrio.eu/torresquevedo.htm. Dum tiu ĉi jaro oni organizis diversajn agadojn pri li, ĉar ĝuste ĉijare fariĝas 100-jara la Spanish Aerocar, la plej antikva ankoraŭ funkcianta transportilo super la Niagaraj Akvofaloj, kiun li dizajnis.

Ankaŭ en Bilbao okazis en julio ekspozicio kaj prezentado de libro pri ankoraŭ alia historia esperantisto, la konsilisto de la unua aŭtonoma vaska registaro Juan Gracia, al kiu estis invitita nia veterana amiko Eduardo Larrouy. Nun eblas aliri la biografion, kiu enhavas ĉapitron pri lia esperantista agado, ĉe la retejo de la vaska registaro.




**228 MUJERES EUROPEAS SE FAMILIARIZAN CON EL ESPERANTO EN SEVILLA**

El pasado sábado 15 de octubre tuvo lugar un evento sin precedentes en la historia del esperanto en Sevilla.

*Pop in the City* es una suerte de gincana turística en la que en torno a 400-700 mujeres, provenientes de toda Europa, recorren la ciudad enfrentándose a todo tipo de pruebas deportivas, culturales, artísticas y solidarias. Se celebra cuatro veces al año, cada vez en una ciudad europea distinta, y ese día la ciudad elegida fue Sevilla.

En este *Pop in Sevilla 2016*, una de las pruebas "sorpresa" les esperaba en el centro vecinal Pumarejo, situado en la casa-palacio homónima. Su misión: en unos veinticinco minutos debían asistir a una clase intensiva de iniciación al esperanto y a continuación pasar con éxito una prueba de traducción a este idioma. Las clases de esperanto corrieron a cargo de la Asociación Sevillana de Esperanto. En total, en las ocho horas que duró el evento, recibieron clases 228 mujeres, principalmente en francés, pero también en inglés y en

**228 EŬROPAJ VIRINOJ FAMILIARIĜAS KUN ESPERANTO EN SEVILO**

La pasintan 15-an de oktobro okazis senprecedenta evento en la historio de Esperanto en Sevilo.

*Pop in the City* estas speco de turista ĝimkano, kie ĉ. 400-700 virinoj, devenantaj el la tuta Eŭropo, trakuras urbon frontante ĉiajn sportajn, kulturajn, artajn kaj solidarajn provojn. Ĝi disvolviĝas 4 fojojn jare, ĉiam en malsama eŭropa urbo, kaj ĉifoje la elektita urbo estis Sevilo.

En tiu ĉi eldono *Pop in Sevilla 2016*, unu el la pruvoj surprizigaj atendis ilin en la najbara centro Pumarejo, situita en la samnoma palaco. Ilia celo estis ĉeesti 25-minutan intensivan lecionon de enkonduko en Esperanto, kaj sekve sukcesi trapasi ekzamenon pri tradukado al tiu ĉi lingvo. La kursoj de Esperanto estis instruitaj de la Sevila Esperanto-Asocio. Entute, dum la ok horoj kiujn daŭris la evento, ricevis la lecionojn 228 virinoj, precipe en la franca, sed ankaŭ en la angla kaj hispana lingvoj. Venis partoprenantoj el Francio, Belgio,

español. Había participantes provenientes de Francia, Bélgica, Suiza, Reino Unido e incluso de Hong Kong.

Aunque la mayoría de ellas prácticamente desconocía la existencia del esperanto antes del evento, las reacciones de las participantes fueron bastante positivas, terminando más de una clase con un sonoro aplauso, al igual que la mención del desafío esperantista durante la noche en que se repartieron los premios.

¿Cuántas de las participantes continuarán su aprendizaje del esperanto? ¿Cuántas de ellas se convertirán en firmes defensoras del esperanto, lo aprendan o no? El tiempo dirá, pero, mientras tanto, como dice la web del evento: *Dans le magnifique patio Pumarejo, nos participantes ont essayé de se dépatouiller en Esperanto. Quel bonheur de prononcer sa première phrase internationale !*

Svislando, Britio kaj eĉ Honkongo.

Eĉ se plejmulto el ili praktike ne konis la ekziston de Esperanto antaŭ la evento, la reagoj de la partoprenintoj estis tre pozitivaj, kaj pluraj lecionoj finiĝis per laŭta aplaŭdo, same kiel la mencio de la defio dum la nokta festo kie oni disdonis la premiojn.

Kiom da ĉeestintoj daŭrigos la lernadon de Esperanto? Kiom el ili fariĝos fortaj defendantoj de la lingvo, ĉu lernonte ĝin aŭ ne? Neniu scias, sed, kiel asertas la retejo de la evento: *Dans le magnifique patio Pumarejo, nos participantes ont essayé de se dépatouiller en Esperanto. Quel bonheur de prononcer sa première phrase internationale !*




**MEDIOS DE COMUNICACIÓN DE LA FEDERACIÓN**

En breves días llegará al domicilio de los socios de la Federación Española de Esperanto el próximo número de nuestro "Boletín". Recordamos mientras tanto que es posible leerlo ya en el espacio interior de nuestra web, en la dirección http://www.esperanto.es/hef/index.php/nepublika-zono.

Recordamos también que los socios disponen de una lista de correo, donde se pueden discutir los temas ligados a HEF, como por ejemplo la discusión sobre el estatuto de UEA al que nos hemos referido antes. Recordamos que la dirección es: https://es.groups.yahoo.com/groups/hef-anaro y que no se debe temer un exceso de mensajes, dado que el objetivo es tratar sólo de temas relacionados directa o indirectamente con los objetivos de la organización.

Además, recordamos que es posible contactar con nuestra asociación por medio de nuestras redes sociales, por ejemplo Facebook y Twitter con respectivamente 1300 y 850 seguidores, También HEJS, nuestra sección juvenil, dispone de sus propios canales: https://www.facebook.com/juventud.esperanto.hejs/ y https://twitter.com/HEJSesperanto.

No dejes de visitar nuestro canal en Youtube, con más de 70.000 visitas (sin contar los canales hermanos con material de nuestras actividades, algunos de cuyos vídeos han recibido más de 30000 visitas)

Finalmente, si empleas la aplicación Telegram en tu móvil, visita los numerosos canales empleados para utilizar el esperanto: https://telegramo.org/. Busca "hispana agado" si quieres colaborar con nuestras actividades.

**RETA KOMUNIKADO ĈE HEF**

Baldaŭ alvenos al la hejmoj de la anoj de Hispana Esperanto-Federacio la plej lasta numero de nia revuo "Boletín". Ni memorigas ke dume eblas ĝin jam legi en la interna spaco de nia retejo, en la adreso http://www.esperanto.es/hef/index.php/nepublika-zono.

Ni memorigas ankaŭ ke la anoj disponas je retpoŝta listo, kie ili povas diskuti la temojn ligitajn al HEF, kiel ekzemple la debaton pri la nova statuto de UEA kiun ni antaŭe menciis. Ni memorigas ke la adreso estas: https://es.groups.yahoo.com/groups/hef-anaro kaj ke oni ne devas timi tro grandan nombron da mesaĝoj, ĉar la celo estas pritrakti nur temojn rekte aŭ nerekte ligitajn al la celoj de la asocio.

Krome, ni rememorigas ke eblas kontakti kun la asocio pere de niaj sociaj retoj, ekzemple per Facebook kaj Twitter kie ni havas respektive ĉ. 1300 kaj 850 ŝatantojn/sekvantojn. Ankaŭ HEJS, nia junulara sekcio, estas tre aktiva per siaj propraj kanaloj: https://www.facebook.com/juventud.esperanto.hejs/ kaj https://twitter.com/HEJSesperanto.

Ne forgesu viziti nian kanalon en Youtube, kun pli ol 70.000 vizitoj (sen konsideri la fratajn kanalojn kun materialo de niaj aktivadoj, kelkaj el kies videoj ricevis pli ol 30.000 vizitojn)

Fine, se vi disponas je la aplikaĵo Telegram en via poŝtelefono aŭ tabulilo, vizitu la multnombrajn kanalojn kreitajn por utiligi Esperanton: https://telegramo.org/. Serĉu "hispana agado" se vi deziras kunlabori en niaj aktivadoj.


La pluvo (La lluvia)
María Villalón
Gitaris Susi Morla
mga
María Villalón - La pluvo - Esperanto